Sceno 8 ok

Petro goes to a restaurant.

Petro: Mi estas malsata.
(al la kelnero) Bonvolu doni al mi sandviĉon.

Kelnero: Jen ĝi!

Petro: Dankon. Bonvolu doni al mi salaton.

Kelnero: Jen ĝi!

Petro: Dankon. Bonvolu doni al mi sukon.

Kelnero: Jen ĝi!

Petro: Dankon. Bonvolu doni al mi glaciaĵon.

Kelnero: Jen ĝi!

Petro: Dankon. Bonvolu doni al mi akvon.

Kelnero: *(ridas)*

Grammar and sentence forms

The infinitive: ***-i*** *(e.g.* don**i***)*
The imperative: ***-u*** *(e.g.* don**u***)*
The imperative with a second verb: ***-u -i***
"Bonvol**u -i** ..."
Bonvol**u** don**i** al mi glaciaĵon.
"Donu al mi **-on.**"
Donu al mi sandviĉ**on**!

Sceno 9 naŭ

Silvja gets some fruit for her getaway.

Silvja: Mi petas persikon, Paĉjo.

Reĝo: Jes! *(al la Reĝino)* Persikon!

Reĝino: Jen persiko.

Silvja: Dankon. Donu al mi prunon kaj vinberojn.

Reĝo: Jes. *(al la Reĝino)* Prunon kaj vinberojn!

Reĝino: Jen pruno kaj vinberoj.

Silvja: Dankon!

Sceno 10 dek

Korvaks orders Karlo to count trees, etc, in the garden.

Korvaks: Karlo!

Karlo: Jes?

Korvaks: Arboj!

Karlo: Arboj?

Korvaks: Jes. Kiom da arboj estas? Kalkulu!

Karlo: Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek.

The cat talks to the computer.

Kato: Kiom da arboj estas?

Komputilo: Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek.

Grammar and sentence forms

Numerals 1-10

Kiom da...? *(a part of the whole)*
Kalkulu, **kiom da** arboj estas?

Back in the garden.

Korvaks: Arbustoj! Kiom da arbustoj estas?

Karlo: Kiom? Du, kvar, ses, ok, dek!

Korvaks: Kaj kiom da floroj estas?

Karlo: Floroj?

Korvaks: Jes, jes! Kiom da floroj estas?

Karlo: Dek? Kvindek? Cent?
Mi ne scias!

Mi ne scias.

Sceno 11 dek unu

Petro arrives at a crossroads.



Petro: Mi ne scias.

Sceno 12 dek du

Karlo counts the flowers.

Karlo: Cent sep! Cent ok...

Silvja: Cent naŭ!

Karlo: Cent dek!

Numbers: 11-100 - 1000
dek unu - cent - mil



Silvja: Karlo, Donu al mi rozon,
...mi petas! Dankon!
Mi amas rozojn!

Karlo: Kaj mi amas vin!

Silvja: Ho, rigardu! Mi havas rozon. Mi havas prunon,
persikon kaj vinberojn.
Mi havas sandviĉon kaj mapon.

Karlo: Kaj mi havas... motorciklon!
Mi amas vin!

Silvja: Mi amas vin!

Ambaŭ: Ek! Ek!

Korvaks: Ne! Ne! Ne!
Mi amas la princinon.
Mi amas Silvjan!

Transitive verbs
...-as -on.
Mi **havas** roz**on**.
Mi **havas** map**on**.
Mi **amas** la princin**on**.

Sceno 13 dek tri

Karlo kaj Silvja motorciklas.

Silvja: A, E, I, O, U
Ni forkuru!
A, U, O, I, E
Kuraĝe!

Karlo: A, E, I, U, O
Ek antaŭen do!
I, O, U, E, A

Ambaŭ: Hura, hura, hura!

Silvja: A, U, I, O, E

Karlo: Mi vin amas tre!

Silvja: E, I, O, U, A

Ambaŭ: Mi amas...
A, E, O, U, I
Mi amas vin!

Pronouns as direct objects:
mi**n**, vi**n**
Mi amas vi**n**.
Sekvu mi**n**.

Flexible word order:
Mi**n** amas vi.
Mi vi**n** amas.

Reĝo: La ĝardenisto amas la princinon?

Korvaks: Jes, jes!

Reĝo: Ne, ne, ne!

Reĝino: La princino amas la ĝardeniston?

Korvaks: Jes, jes!

Reĝino: Ne, ne!

Reĝo: Ni iru. Sekvu min! Ek!

Reĝo kaj Korvaks: Ĝis revido!

Sceno 1

Karlo kaj Silvja motorciklas.



Karlo: Saluton!

Silvja: Saluton! Paĉjo, Panjo!

Karlo: Korvaks!

Reĝo: Silvja! Silvja!

Silvja: Ho, Panjo!

Reĝo: *(al Karlo)* Grrrr!

Karlo: Mi amas princinon Silvja.

Imperative **-u** *for orders, addition of* **-n** *for direct object*
Arestu li**n**!

Reĝo: Arestu lin!

Korvaks: Arestu lin!

Generalo: Arestu lin!

Oficiro: Arestu lin!

Suboficiro: Arestu lin!

Soldatoj: Arestu lin! Arestu lin!
Arestu lin!...

Reĝo: Dankon, Korvaks.

Sceno 2

En la malliberejo.

Oficiro: Nomo?
Karlo: Karlo.
Oficiro: Aĝo?
Karlo: Dudek.
Oficiro: Profesio?
Karlo: Ĝardenisto.
Oficiro: Forkonduku lin.
Korvaks: Numero dek naŭ.
Oficiro: Numero dek naŭ?
Oficiro: *(al la gardistoj)* Numero dek naŭ!
Gardistoj: Numero dek naŭ?
Gardistoj: Naŭ.
Dek.
Dek unu.
Dek du.
Dek tri.
Dek kvar.
Dek kvin.
Dek ses.
Dek sep.
Dek ok.
Dek naŭ.
Dudek.
Ho! Dek naŭ!

En la ĉelo.

Karlo: Ah! Monstro!
Mazi: Saluton. Mi estas Mazi.
Granda Mazi.